

11

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA
ESPERANTISTA ASOCIO



NOVEMBRO 1962

E N H A V O

	Paĝo
* * * La abonigado gravega kaj urĝa tasko	1
Ivan Draganov. La sofiaj esperantistoj diskutas la lernolibron	2
Ivan Canev. Lernolibro de Esperanto	3
* * * 19-a internacia junulara esperanto-kongreso	4
Ivan Keremidčiev Esperov. Gravaj kaj respondecaj taskoj antaŭ la ĵurnalistoj-esperantistoj	6
Violin Oljanov. La animo de la homoj	8
Georgi Dikovski. Epigramoj	9
Organiza vivo	9
* * * Plivigliĝo ĉirkaŭ la montodomo „Esperanto“	14
Teodoro Kulagin. El Sovetunio	15

Abonkoto: jara — 1,4 levoj, duonjara — 0,7 lv. Por eksterlando — 2lv, 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,6 lv.

Reklamtarifo: 0,15 levoj por cm²; korespondanconoj: 5 stofinkoj por ĉiu vorto. Eksterlandaj adresoj publikigataj senpage. Ekstera kovrilpaĝo — 60 lv.

LANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Ing. Cefo Fico, 44 Rruga Stafa, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, via A. Boito 6, Padova

KOREO: Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, Bucureşti 5

SOVETUNIO: Ivan Palkin, Mitnaja ul. 52/54 kv. 19, Moskva, B—162

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109—a.

**LA ABONIGADO — GRAVEGA KAJ URĜA TASKO**

Venis la tempo por renovigi la abonojn por la nova jaro. Kiel jam estas anoncite la abonado por 1963 efektiviĝos per la lokaj poŝtejoj, kio ege faciligos kiel la asocion, tiel ankaŭ la societojn kaj la abonantojn. La lastaj tiumaniere ricevos la gazeton pli rapide kaj en pli bona stato. La asocia kancelario liberiĝas de la peza kaj temporaba ekspedado, kio permesos dediĉi pli da tempo por organiza laboro. La regula ricevado ankaŭ estos pli certa.

Sed tiu nova maniero de abonado kaŝas ankaŭ danĝeron. Laŭ informo de la centra fako de la poŝtejoj tre malmulte da abonoj venis ĝis nun. Kaj ja estas templimo — la 20-a de decembro, kiu rapide alproksimiĝas. Do, ekzistas reala danĝero malpliigi la nombron de la abonintoj, ĉar niaj esperantistoj bedaŭrinde kutimas prokrasti la abonadon. Jen pro kio la societoj kaj niaj aktivuloj devas esti sur sia posteno. Ili tute ne devas konsideri sin liberigitaj de la zorgoj varbi abonantojn. Kontraŭe, ili devas kun duobligitaj fortoj organizi nun tiun ĉi gravegan laboron, por ke ne restu eĉ unu esperantisto sen „Bulgara esperantisto“. Ankoraŭ ekzistas tie kaj tie la hontinda fakto, ke eĉ estraroj de societoj ne abonas kaj ne legas la asocian presorganon. Nature ĉe tiaj „estaroj“ la aboniga kampanjo ne marŝos bone. La societanoj mem devas iniciati la forpiron de la estraroj de tiaj „gvidantoj“.

Nun la estraroj helpate de la aktivuloj devas fari detalan planon pri la organizo de la aboniga kampanjo. La templimo por la abonigantoj ne devas esti pli malfrua ol la 10-a de decembro. Sed la abonigantoj ne devas atendi tiun daton kaj post kolekto de ia kvanto, ekzemple 10 aŭ 20 abonantoj tuj transdoni ilin en la poŝtejo. Tuj post la 10-a de decembro la estraroj devas esolori kaj konstati la staton de la aboniga kampanjo, kaj se estos restintaj ankoraŭ neabonigitaj kamaradoj, oni entreprenu urĝajn klopodojn por ties abonigo.

„Bulgara Esperantisto“ povas pliriĉiĝi laŭenhave kaj laŭforme nur se ĝi havas multe da abonantoj. La stabila stato de nia presorgano difinas la firmecon de la asocio kaj de nia movado. Sed por tio estas necesa ne rezonado kaj babilado, sed abnegacia laborado. Ĉiu kiu amas nian movadon kiu vere deziras ĝian progreson, ne ŝparos sian tempon kaj penon por disvastiĝi nian karan kaj nepre necesan presorganon „Bulgara Esperantisto“.

Per agado ni montru tiun nian amon!

La demando pri bona lernolibro estas tre grava por la evoluo de Esperanto-movado en nia lando. Societo „Maksim Gorkij“ dediĉis du kunvenojn al la diskutado de la lernolibro de Ivan Sarafov kaj Simeon Ĥesapĉiev.

En la unua kunveno la 15-an de oktobro 1962 raporton faris **Ivan Canev**. Resumo de lia raporto estas publikigita aparte.

Unua prenis la parolon **Atanas D. Atanasov** — **ADA**. Laŭ li la lernolibro de Iv. S. kaj S. Ĥ. estas bone korektita. Rilate al ĝia metodo li trovas, ke la lecionoj estas bone aranĝitaj. Pri la lingvaĵo de la lernolibro oni ne povas fari riproĉon. Tamen en la klarigoj de la gramatikaj reguloj estas iaj mankoj: oni ne donas sufiĉajn klarigojn pri la pronomoj — „kiu-kio“ kaj „tiu-tio“, pri la adverboj, pri la akuzativo, pri la infinitivo, pri la adjektivoj k. a.. Laŭ la aŭtoroj, la sono kaj litero „ѣ“ ne povas esti transskribita per „a“, malgraŭ tio en la lecionoj troviĝas vortoj transskribitaj tiamaniere, kiel Târnovo, Kazanlâk k. a. En konkludo **ADA** diris: „La libro ne estas malbona“.

En la dua kunveno je la 29-a de oktobro 1962 unua prenis la parolon **Asen Grigorov**. La diskutado de la lernolibro — li diris — estas tre grava. Apenaŭ post la uzo de la lernolibro kaj vidante la rezultojn de ĝi, tiam oni povas diri ĉu ĝi estas bona aŭ ne, kaj ankaŭ post la trarigardo de iuj spertaj esperantistoj.

Nature, ni estas en la komenco de la lernjaro, por ke ni povu esprimi, ĉu la lernolibro estas bona.

La nova lernolibro ne distingiĝas konsiderinde de la dua eldono. En la libro oni ne donas sufiĉe da loko al la afiksoj. Oni tamen superflue enkondukis la novajn afiksojn, kiel retro k. a.

La lecionoj estas ŝarĝitaj per multaj gramatikaj reguloj, kio malfaciligas la laboron kaj por la instruisto, kaj por la lernanto. En la libro estas ankaŭ tre multe da bulgaraj tekstoj por tradukado kaj aliaj mankoj, pri kiuj oni jam parolis en la pasinta kunveno.

Rilate al la ortografio, en ĝi ankaŭ estas mankoj: ĝi ne povas esti libera, sed ĝusta, nur esperanta. La lernolibro devas esti facile perceptebla.

Violin Oljanov opinias, ke la lernolibro estas plibonigita kompare kun la dua eldono. Li diris, ke estas ankaŭ iuj mankoj: nesufiĉaj tekstoj de la lecionoj — ili ne prezentas bazon por ekzercoj. Ne estas donitaj vortoj, kiujn oni ofte uzas en la vivo. La lecionoj estas ŝarĝitaj per multaj gramatikaj reguloj. Estas ankaŭ eraroj.

Ljubomir Marikin opinias, ke oni devas eldoni apartajn lernolibrojn por infanoj kaj por grandaĝuloj. La kritikata lernolibro estas bona por mezklara homoj. Pro tio oni devas atentigi pri la gravaj mankoj de la lernolibro, sed ne pri la ordinaraĵoj. En la libro devas esti bildoj. Por ĉiu leciono oni devas prepari vortaron.

D-ro **Stefan Kadiev** opinias, ke la specialistoj devas pridiskuti la lernolibron, kaj tio devas okazi ne nur en daŭro de unu horo.

Atanas Lakov diris, ke la asocio organizis konkurson. Oni prezentis 9 projektojn. Ĉiuj projektoj estis recenzitaj kaj rezulte al la recenzoj CK de BEA aprobis tri projektojn kaj tiu de Iv. Sarafov kaj Sim. Ĥesapĉiev estis metita sur la unuan lokon.

Ivan Sarafov, unu el la aŭtoroj de la lernolibro, respondis al ĉiuj kritikoj. Li diris, ke oni devas ĉiam akcepti la kritikon, sed ĝi devas esti senpartia kaj tenetendeca. Nur kritikante serioze kaj objekte ni povas atingi progreson kaj senĉesan evoluon antaŭen. Sed ni ne povas akcepti la kritikon de Iv. Canev, ke oni ne devas meti nenotitajn kantojn. Pri la bona ilustrado neniu kontraŭdiros, sed tio dependas ne de la aŭtoroj, sed de la eldonejo. Pri la transskribado de „ѣ“ la aŭtoroj ne estis konsentaj kun la redaktoro N. Mânkov, kiu redaktis en tiu senco la tekston.

Metodi Panĉev tuŝis la demandon pri la konkurso. Oni respondis, ke en la konkurso partoprenis, aŭtoroj kun naŭ projektoj. (**ADA** ne partoprenis, kvankam li estis speciale invitita). Kvinmembra komisiono de recenzantoj aprobis tri projektojn: de Sarafov—Ĥesapĉiev, As. Grigorov kaj G. Dimov — Z. Hans (la lasta projekto ne estas ĝis nun finverkita). Nia lernolibro estas bone akceptita ne nur en la tuta lando (la tria eldono jam estas elĉerpita nur en daŭro de du monatoj), sed ankaŭ eksterlande. La aŭtoroj ricevas multajn leterojn, en kiuj diversaj esperantistoj esprimas sian ĝojon, ke aperis tiel bona lernolibro.

Konklude Iv. Sarafov dankis al la kritikantoj kaj deklaris, ke iujn el la kritiknotoj la aŭtoroj havas antaŭvide, se la lernolibro aperos en kvara relaborita eldono.

Iv. Draganov



Lerno'ibro de Esperanto

Antaŭ nelonge aperis Lernolibro de Esperanto de Ivan Sărafov kaj Simeon Hēsapčiev en tria eldono.

La enkonduko estas trafe mallongigita. La mallongaj metodikaj instrukcioj vere estas tre koncizaj, sed valoraj, praktikaj konsiloj por la kursgvidantoj. Eĉ nespartaj kursgvidantoj vidos kaj komprenos, ke la skeleto, plano de modela metodika leciono estas donita. Sufiĉos, se oni kompletigos per konkreta materialo la koncernan lecionon kaj la sukceso estas duone garantiita. Restas la majstreco de la instruonto por atingi plenan sukceson.

Tuŝante la metodikajn notojn, mi opinias, ke oni devas tuŝi ĝenerale la metodikan flankon de la tuta lernolibro. Laŭ mi ĝi estas bone konstruita. Oni komencas de l' konataj kaj facilaj aferoj kaj senpere transiras al la pli malfacilaj kaj nekonataj aferoj. La apartaj lecionoj prezentas per si mem komplete tutan unuon kun varia materialo — baza legaĵo, gramatikaj reguloj, legaĵoj ktp. La baza teksto de la instruota leciono estas bone elektita kaj aranĝita rakonto, kiu entenas la novajn gramatikajn. En tiu direkto la aŭtoroj bone agis prenante tutecajn rakontojn, kaj ne apartajn frazojn. La tuteca legaĵo estas pli facile lernebla kaj pli taŭge helpas la bonan ekposedon de la gramatikaĵo kaj de la lingvo mem. La apartaj frazoj, kiom ajn decaj ili estu, ne povas utili tiom, kiom la tuteca materialo. Komparante la legaĵojn de la nova kaj malnovaj eldonaĵoj, oni konstatas, ke la aŭtoroj grave relaboris la bazajn legaĵojn. La lastaj estas iom mallongigitaj laŭ la ebla grado. La tradukoj estas pliĝustigitaj kiel ekz. IX leciono en la titolo estas uzita „konversacio“ anstataŭ „interparolo“; en X leciono estas uzita la frazo „Amiko estas elprovata en danĝero“ anstataŭ „Amikon montras danĝero“ por traduko de la koncerna bulgara teksto „Priatel se v nuĵda poznava“ ktp.

La tuta novinstruota materialo estas presita per duongrasaj literoj. Tiumaniere ĝi estas pli okulfrapa kaj impresiga, pli facile lernebla kaj perceptebla. Tio estas ne malgrava fakto.

La lernolibro estas verkita laŭ la miksita metodo. La bazaj legaĵoj estas akompanataj de gramatikaj reguloj. La gramatikaj difinoj estas simplaj kaj klaraj. Tio ĉi faras la lernolibron bona helpilo por kursaj okupoj kaj por aŭtodidaktaj. Ĝi estas kreita nek por infanoj, nek por progresintoj en la lingvo. Pro manko de tiaj diferencaj helpiloj la aŭtoroj strebis verki taŭgan helpilon por la meza nivelo de la lernantoj kaj ĝi sukcese solvas la problemon.

La lecionoj havas varian materialon kaj la instruonto havas eblecon elekti. La tuta rakonto de la baza teksto ne estas strikta kaj deviga. Oni povas elekti laŭ plaĉo kaj laŭ neceso. Tio ĉi estas bona flanko.

La ekzercoj povas esti tradukataj kaj ankaŭ utiligitaj por hejma laboro. Kompreneble la instruonto estas libera elekti inter ili por speciale kompilita tasko.

La materialo en la lecionoj de la nova eldonaĵo estas variigita kaj kompletigita. Aperis legaĵoj, demandoj, kvadrataj enigmoj.

La demandoj estas tiel aranĝitaj, ke per iliaj respondoj oni povas ripeti la tutan bazan tekston kaj plifirmigi la sciojn. Ilin la instruanto bone povas utiligi ankaŭ por hejma laboro. Inter la legaĵoj estas trovitaj mallongaj spritaĵoj, popularaj saĝaĵoj, kiuj provokus bonhumoron, variigus kaj facile pliriĉigus la lingvajon.

La enigmoj per si mem prezentas taskojn. En ilia solvo la lernanto vole-nevole devas enpeniĝi, iom mediti kaj serĉi la konvenajn vortojn. La praktiko montras kiamaniere kaj en kia grado oni povos ilin utiligi kaj kiom ili utilos.

La pensoj de eminentuloj estas bone elektitaj kaj aranĝitaj. En la komencaj lecionoj, kiam la lernantoj ankoraŭ ne scipovas la lingvon, ili estas presitaj en bulgara lingvo kaj en pli postaj lecionoj — en Esperanto. Per ili nerimarkeble la lernantoj amasigos aŭtentikajn kaj kompetentajn opiniojn kaj argumentojn pri kaj por Esperanto. Tiamaniere ili informiĝos kaj certigos, ke Esperanto estas gravega evento kaj inda verko de la homa genio.

La vortaro, kies vortoj estas troveblaj nur en la unua parto de la lernolibro — entenas ĉirkaŭ 1400 vortojn, el kiuj ĉirkaŭ 250 estas tute konataj. Sekve, la nekonataj vortoj restas 1150. En tiu nombro inkluzivigas radikoj, afiksoj, prepozicioj, konjunkcioj ktp. 1150 dividita en 26 lecionoj — po 44 vortoj en leciono meze. Tio estas ne malmulte. Tamen en la lecionoj estas varia materialo, nedevisa por ellerno — legaĵoj, pensoj ktp., kies vortoj ŝveligas la vortaron. Se ni ne kalkulas ilin, eble la vortaro estos en la dezirita amplekso.

La lernolibro havas avantaĝon ankaŭ per sia dua parto — la legolibro. Ĝia enhavo estas tre varia kaj interesa. La legaĵoj — prozaĵ kaj poeziaĵ — estas bone elektitaj kaj aranĝitaj. Per ili la lernantoj ricevas valorajn sciojn pri la historio de Esperanto kaj E-movado kaj pri diversaj aktualaj demandoj de la socia vivo. La legaĵoj estas tre aktualaj kaj mankas anakronismoj.

La legolibro estas kompletigita ankaŭ per kelkaj kantoj notarangitaj aŭ ne. La pozitiva rolo de la kantoj ĉe la instruado estas senduba. Per la kanto oni plivigligas la partoprenon en la kursa laboro, kuraĝigas kaj entuziasmigas la ĝelernantojn. Ili faciligas gajan kaj agrablan pasigon de la tempo, refreŝigas la cerbojn de la partoprenantoj en la esperantaj kursoj.

Tamen la verko ne estas senmanka kaj senerara. La ilustrado de la lernolibro estas malriĉa. En la unua parto estas nur unu sola bildo, kaj en la dua — nur kelkaj portretoj de verkistoj. Jen estas tre grava manko. La dua parto povas esti kompletigita ankoraŭ per kelkaj portretoj de famaj verkistoj, sed plej grava estas la ilustrado de la unua parto — la lernolibro. Oni devas ilustrati ĉiun lecionon per konvenaj bildoj kaj tiam ĝia kvalito kiel lernolibro kaj helpilo por ekposedo pri facile de Esperanto sufiĉe altiĝos. Krom tio la bildoj povas esti utiligataj por hejma laboro pri liberaj verkoj fare de la lernantoj. Ĝenerale la ilustrado de la lernolibroj estas sendube utila kaj dezirinda.

En la lernolibro mankas unueco kaj firma opinio pri la transkribo de la bulgara litero Ъ. Tion oni ne devas allasi.

Estas kelkaj preŝeraroj, kiuj estas facile korekteblaj.

Konklude mi volas diri jenon: La lernolibro estas taŭga helpilo, metodike bone aranĝita kaj ĝi kontentigas la postulojn doni bonajn konojn en Esperanto. La eraroj ne estas gravaj, facile forigeblaj kaj ne malbonigas la kvalitojn. La lastaj povas esti plibonigitaj per relaboro kaj forigo de la mankoj laŭ la supre eldiritaj de mi rimarkoj kaj rekomendoj.

Do, ĉar la verko estas serioza kaj necese, mi opinias, ke oni devas ĝin publike pridiskuti en pli larĝa rondo de legantoj en la tuta lando. Tiamaniere oni povos tuŝi pli multajn flankojn kaj demandojn el diversaj vidpunktoj, kion oni ne povas atingi nur per maldetala analizo de unu gazeta recenzo.

Mia apelacio estas: Gekamaradoj, amase partoprenu la pridiskuton de „Lernolibro de Esperanto“!

Ivan Iv. Canev

19-a INTERNACIA JUNULARA ESPERANTO-KONGRESO

VRACA, 27 JULIO — 3 AŬGUSTO 1963

Korespondadreso: Junulara Kongreso, Sofio, p. k. 537 (Bulgario).

Proviza programo: Interkonatiga vespero, solena malfermo, kongresbalo-veniza vespero, belarta vespero, diskutoj, prelegoj, sportaj konkursoj, duontaga ekskurso al „Ledenika“, gaja vespero — „La mikrofono je via dispono!“, oratoria konkurso, tuttaga ekskurso al „Deogradĉik“, ĝenerala kunveno de TEJO, renkonto kun la oka junularo kaj pluraj surprizoj.

Kotzoj: La kotizoj inkluzivas ĉiujn manĝojn, la dormadon en komuna loĝejo, la ekskursojn kaj ĉiujn kongresajn aranĝojn kaj estas por membroj de TEJO (membroj de BEA):

	ĝis la 1.IV.1963	post la 1.IV.1963
malpli ol 20-jaraj	18 US dol. 21 lv	20 US dol. 23,50 lv
pli ol 20-jaraj	20 US dol. 23.50 lv	20 US dol. 26 lv

aŭ egalvaloro. Nemembroj de TEJO pagas 1 US dol. pli.

Kiel aliĝi. La bulgaraj gekongresanoj aliĝos nur pere de la junularaj grupoj aŭ pere de la societoj de BEA. La nombro de la lokoj por bulgaraj gejunuloj estas limigita kaj frua aliĝo estas tre rekomendinda. La estraroj de la lokaj grupoj kaj societoj estas petataj aliĝi al la kongreso nur gejunulojn, kiuj efektive konas la lingvon, aktivulojn de la movado, kiuj per sia partopreno vere helpos por la sukceso de la diversaj kongresaj eroj (diskutoj, konkursoj, belartaj programoj ktp.).

La aliĝilojn oni sendu al la korespondadreso de la kongreso. Se mankas aliĝiloj, oni uzu samformatan (148/210 mm, folion).

La kotizon oni transpagu al konto: „BES, BEM, 19-a Kongreso de TEJO“ n-ro 15 /1886 en DSK (Ŝtata Ŝparkaso/ — Sofia) Blagoevski rajon.

Kongresa Komitato

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
19-A INTERNACIA JUNULARA ESPERANTO-KONGRESO
Vraca, Bulgario, 27 julio — 3 aŭgusto 1963

korespondadreso: JUNULARA KONGRESO
Sofio, p. k. 587, Bulgario

konto: „BES, BEM, 19-a Kongreso de TEJO“
n-ro 15 /1886 en DSK—Sofia/ Blagoevski rajon.



ALIĜILO

Familia nomo: S-ro Vegetarano Jes Ne
F-ino

Propra nomo: Mi partoprenos Jes Ne
la UK en Sofio

Adreso: (urbo) Membro de TEJO Jes Ne
(str. kaj n-ro).....

Naskiĝdato:

Lando:

Mi pagas la kotizon de US dol.+I US dol.

..... (nur por nemembroj de TEJO)
..... levoj (por bulgaraj kongresanoj)

al
(pagon kaj aliĝilon sendu nepre al sama instanco)

Dato: Subskribo:

Skribu legeble se vi deziras rekonii vian nomon en la kongresa libro!
Se mankas aliĝiloj, uzu samformatan (A₄—148/210) folion!

Ne atendu la finan tagon de la aboniga kampanjo! Ne risku resti sen la asocia organo „Bulgara Esperantisto“! Tuj abonu kaj abonigu vian amikon kaj vian korespondanton!

ВАЖНИ И ОТГОВОРНИ ЗАДАЧИ ПРЕД ЖУРНАЛИСТИТЕ-ЕСПЕРАНТИСТИ

С голяма радост и задоволство българските есперантисти посрещнаха съобщението, че 48-ят световен есперантски конгрес идущата година ще се състои в нашата хубава столица. За неговата всестранна подготовка и блестящо провеждане огромна работа започнаха да вършат и предстои да извършат както ЦК на Българския есперантски съюз, местният конгресен комитет, софийските есперантски дружества, така и есперантистите от цялата страна. Всички сили, много старание и труд трябва да вложим и с най-голямо чувство на отговорност да отговорим на оказаната ни чест и доверие от световното есперантско движение.

Но това голямо международно есперантско събитие поставя извънредно важни и отговорни задачи и пред всички български журналисти-есперантисти. От година на година, заедно с бурното развитие на нашата родина по пътя на социализма и комунизма, расте и интересът на хората и есперантистите от другите социалистически, несоциалистически и капиталистически страни към България. Повечето от тях са чели и са се запознали с нашата страна от нашите есперантски списания, проспекти и книги. Слушали са за нея от своите сънародници, посетили България, от предаванията на радио София на есперанто. А мнозина, които са имали щастието с очите си да видят веднаж нашата хубава столица, живописните балкани и плодородни кооперативни поля, прекрасните черноморски курорти, които са останали възхитени от гостоприемството, трудолюбието и миролюбието на българския народ, изявяват съкровено то си желание още веднаж и дважд да посетят страната ни.

Ето защо неизменен дълг на всеки есперантист-журналист — редактор, публицист и писател, кореспондент, дописник, шатен или нешатен сътрудник на централния, местния и низовия печат, на БТА, радиото, телевизията, на издателствата и т. н. е да разгърне своите творчески сили за задоволяване на големия интерес към нашата страна и народа ни. Всички членове и нечленове на журналистическата секция при ЦК на БЕС, всички събратя по перо трябва да разширят своите международни връзки с журналисти, редактори и публицисти от другите страни, със своите есперантски кореспонденти и още от сега да започнат да им изпращат статии, информации, репортажи, очерци, снимки и други материали, за да ги публикуват в техните есперантски и неесперантски вестници и списания, да ги разгласяват по радиостанциите в своите страни.

Задачата е чрез тези журналистически материали да правим достойние на есперантския и неесперантския свят в чужбина огромните успехи на родината ни в политическото, икономическото и културното изграждане на социализма, да ги запознаваме с историята, бита, културата, живота и природните красоти на нашата страна. А ние има какво да покажем на нашите кореспонденти и трудещите се от другите страни. Ние трябва патриотично, с гордост да им разкажем и за светлите перспективи, които директивите на Осмия конгрес на нашата героична Българска комунистическа партия чертаят пред народа ни до 1980 година, за светлото утре и щастливия и богат живот, който със своя самоотвержен труд ще изгради за себе си народът ни в недалечното бъдеще.

Богат източник за написването на такива материали е и самият наш социалистически живот. Факти и примери можем да черпим и с двете ръце от съзидателния труд на народа, на славната наша работническа класа, се-



ляните-кооператори и интелигенцията, от забележителните успехи в политическото, икономическото и културното строителство. Освен от самия живот, такива факти и примери можем да почерпим и от материалите, които всекидневно се публикуват в нашия печат. Освен нашите собствени материали, ние можем да превеждаме различни пропагандни материали и от вестниците, списанията, брошурите и пр., да накараме други да ни напишат такива материали, които след превеждане да изпратим на кореспондентите ни в другите страни. Желателно е всяка седмица да напишем, преведем и изпратим поне по една статийка, репортаж или очерк в чужбина. За съвет и помощ в това отношение колегите могат да се обръщат и към ЦК на БЕС, към Ло-Ко-Ко и журналистическата секция при Съюза.

Освен с пропагандата на успехите ни в социалистическото строителство чрез есперанто и своите международни връзки и сътрудничество с колегите от другите страни, ние — журналистите — ще съдействуваме за разширяването и укрепването на солидарността на народите от цял свят, за развитието на дружбата и взаимното разбирателство между тях, независимо от техните национални, расови, религиозни различия и политически убеждения, ще допринасяме за възтържествуване на борбата и стремежите им за запазването на световния мир и човешката цивилизация и култура от разрушение. Чрез цялата тази наша дейност ние ще накараме есперантистите от другите страни да обикнат нашия народ и страната ни и масово да посетят предстоящия международен конгрес в София.

Друга също така важна задача за журналистите е да се популяризира 48-я световен есперантски конгрес сред трудещите се в нашата страна, да запознаят широката общественост с неговото значение, цел и задачи. За тази цел се налага колегите журналисти, публицисти и др. да излизат със статии за конгреса, с информации и дописки за работата по подготовката на конгреса от страна на конгресния комитет и всички есперантисти. Нужно е да се отразява редовно животът на есперантските дружества в централния и местен печат, чрез радиото и радиоуредбите, чрез стенните вестници и пр. Да се покаже растежът на есперантското движение у нас и неговите успехи в пропагандирането на социалистическа България и нейните природни хубости, в борбата за запазване на мира и укрепване приятелството между народите.

Към изпълнението на горепосочените важни и отговорни задачи трябва да се пристъпи незабавно. Време за губене няма. Желателно е всяка журналистическа група и отделен журналист-есперантист още сега да помисли и обсъди задачите и си набележи конкретни планове за тяхното изпълнение — създаване на живи връзки с колеги от другите страни, изработването на тематичен план за статии и други материали, своевременното им написване и изпращане и т. н.

На енергична работа, колеги журналисти! Да дадем и ние своя принос към усилията на българските есперантисти за подготовката и достойното посрещане на международния конгрес, за блестящото му провеждане.

Иван Керемидчиев Есперов,
председател на журналистическата секция при БЕС

Aliĝu al la 48-a Universala Esperanto-kongreso! Sendu la kongreskotizon per poŝtmandato al Bulgara Nacia Banko, Sofia Urba Filio, konto № 105ĉ/2993! Ĝis nun jam aliĝis 125 bulgaraj esperantistoj.

Violin Oljanov

La animo de la homo

[KINO] Ĝi estas profunda kaj netrasidebla. Kaj malmultaj estas tiuj specialistoj de la homanimo, kiuj povas diveni ĝiajn sekretojn, eksenti la vibradon de ĝiaj mildaj kordoj. Des pli malmultaj estas tiuj, kiuj povus proponi al ĝi efikan kuracilon, se ĝi malsanus. La animo estas delikata afero, se oni tuŝus ĝin per malfajnaj fingroj, oni nur malutilus.

Tia estas la baza ideo de la filmo „Nia komuna amiko“, produktaĵo de „Mosfilm“. Ni rigardis jam multe da filmoj pri la kolhoza vivmaniero, pri la kamparlaboro, pri la sankta klopodo de la vilaĝa laborulo. Sed tie ĉi sur la fono de la kolhoza panoramo, ni vidas la vivan homon kiel fokuso de la kontraŭaj tendencoj, kun liaj pozitivaj kaj negativaj trajtoj, kun liaj ĉiutagaj zorgoj kaj ĉagrenoj, kun la eterna batalo por feliĉo.

En la filmo mankas la eternaj du batalantaj flankoj—pozitivaj kaj negativaj herooj. Mankas ankaŭ la ŝablona forigo de respondecaj postenoj. Ĉi tie la batalo estas por likvido de apartaj negativaj ecoj de la homo, por kamarada helpo al li. Ne hazarde oni malfermas la filmon per la karikaturo de la maljuna Arhip, kiu ofie ebrigaĵas kaj ĝia efiko sur li. Ĉi tie ĉiuj herooj estas laboruloj, simplaj homoj, kun siaj virtoj kaj mankoj, inter kiuj elstaras klare la partia sekretario Prohor Kornieĉ. Li estas ĉie, kie estas ŝanceliĝo kaj dubo, ĉagreno kaj malagrabeco, kie estas neceso de konsilo. Tio estas „nia komuna amiko“. Kun sia tuta nerompebla energio li batalas kontraŭ la senkoreco, la malvarmeco de la homoj, la nepripensitaj konkludoj kaj karakterizoj, kontraŭ la dogmatismo, kiu malpurigas nian ĉiutagecon. Estas montritaj vicoj da agantoj — komsomola sekretario Maŝa, la instruistino Lena, la grupestro Lukjanjuk, kiuj volas enigi en la malvastajn kadrojn de iaj neŝanĝeblaj principoj kaj reguloj la tutan multflankan vivon, eĉ la amon. Maŝa ĉiam strebas pritrakti ies konduton en kunsido de la komitato, ŝi ne konas alian manieron por helpi al la kamarado; Lena skribas duon (fiaskan noton) al la lernanto, ĉar li esprimas sian propran opinion, kiu ne koincidas kun la reganta opinio, kun la konfirmita programo, Lukjanjuk estas „enamiĝinta“, sed li opinias, ke lia amata knabino ankoraŭ ne estas inda por li kaj pro tio li devas unue eduki ŝin kaj poste fari al ŝi proponon.

Inter ili klare elstaras la helaj figuroj de la partia sekretario Prohor Kornieĉ kaj la bovidistino Liza Garlovaja. Prohor riproĉas sian edzinon Lena, strebant, ke ŝiaj lernantoj pensu nur ŝablone, ne per la kapoj, li priridas al la tromemfida „principeco“ de Maŝa, nomante ŝin „sekulino“, li kritikas la rilaton de Lukjanjuk al lia amata knabino Liza, karakterizante lin kiel burokrato en la amo.

Pri Liza „la socia opinio“ ne estas bona. Laŭ ĝi ŝi estas „frivola“, „diboĉema“, „stranga“. Apoge al tio, neniu povas doni ian fakton. „Oni parolas“ — jen la plej forta „argumento“. Sed ja estas sciate, kiel facile kaj rapide estas disvastigebla la klaĉo, lanĉita de ĉiu ajn kvartallulinaĉo. La filistroj kaj la klaĉistinoj de ambaŭ seksoj ĝin deprenas kaj kun aparta fervoro disvastigas, kompletigas, ornamas. Sklavoj de tiu truda klaĉo estas iam „seriozaj“ homoj. Ili povas frakasi la senteman homon per senpripensa dirita opinio — „karakterizo“. Disvastigantoj de tiuj ĉi klaĉoj estiĝas ankaŭ tiaj homoj, kiel la prezidanto de la kolhozo Andrej Fomiĉ kaj la elstara brigadestrino Ozornova, kiuj ĝenerale estas bonaj kaj seriozaj homoj. La tuta „kulpo“ de Liza estas, ke ŝi estas sincera, fremda al la afektoj kaj la hipokriteco, kie estas neceso — akretona, senceremonia kaj sarkasma. Por la supra observanto ŝi vere povas montriĝi kiel neserioza, eĉ frivola. Ja ŝi estas juna kaj ludema, incitema, ŝi ŝatas ŝerci. Sed laŭ la filistro tio, kio estas permesebla por la viro, por la virino ne estas. Li sengene povas fari tro grandan konkludon nur de tio, ke la knabino tenis subbrake iun sur la strato. (Kaŝe, kompreneble, oni rajtas ĉion, tio ne „ŝokas la socion“). En tiu ĉi cirkonstancaro kiel terura averto sonas la vortoj de Prohor: „Oni ne devas ofendi la homan dignon. Hodiaŭ oni pardonemas tion, tie kaj tie oni ne rimarkas, sed morgaŭ pro tio oni forigos de la partio“.

Fakte Liza Garlovaja estas bona laborantino, forte kaj pure amanta knabino, kun altaj moralaj kvalitoj. Kiam ŝi ekparolas pri serioza temo, subite ŝia vizaĝo akceptas kontraste-seriozan aspekton kaj antaŭ ni aperas homo, kiu entute ne ŝercas pri la gravaj problemoj de la vivo. Por antaŭgardi sian amaton de eventualaj malagrablaĵoj, ŝi oferas sian amon, la propran feliĉon kaj forveturas.

„Nia komuna amiko“ estas filmo kontraŭ la restaĵoj de la dogmista kaj burokrata pensado en la pasinteco, la ŝablona pensado per pretaj formuloj, kontraŭ la frivoia burokrata filistra rilato al la sentoj de la homoj, por serioza alrigardo en ties animon kaj vere kamaradece helpemo en bezono. Ni, ĉiuj, bezonas pri tia helpo. Ĉi tie eĉ la plej pozitivaj herooj ne estas iaj superteraj idealaj estaĵoj, sed kun siaj homaj mankoj. Tiujn mankojn oni superregas en la laborprocedo, en la kolektiva vivo, per la helpo kaj la zorgo de la kamaradoj.

El la bulgara: Vasilka Petrova

EPIGRAMOJ

1

Gvidanto eminenta,
famfama, elokventa,
sekreton certan uzas
kun hipokrita ruzo :
la pensoj de aliaj —
jen la opinio.
Diriton de vi, oni,
li ĉiam nur . . . aldonas,
ripetas frazojn fremdajn.

2

Prikantas epokojn tempestajn,
heroe batalas per rimoj,
poeto ? . . . Talento forestas.
Pardonu, frazisto sentima.

3

La lingvon scias li profunde,
ekzercas ĉiam ĝin efekte.
Posedas vortojn li abunde,
parolas tamen . . . dialekte.

4

Ne emas li disputi :
laŭ mor' — modesta homo ;
vin vidas — samminute —
ekverŝas kaŝe vomojn.

5

Parolas ĉiam pri la kolektivo
kaj laŭdas ĝian rolon kaj agadon,
sed sian havas la alternativon :
kapablas sola puŝi mondan radon.

Georgi Dikovski

CELEBRADO DE DAVID SASONOV

Antaŭ nelonge la asenovgradaj esperantistoj entreprenis gravan iniciaton — laŭ siaj fortoj kaj eblecoj celerbi la datrevenon de sia patrono David Sasonov okaze de 55 jaroj de lia naskiĝo kaj 20 — de lia heroeca morto. La estraro kaj apartaj societanoj per abnegacia laboro multe kontribuis por ĝia sukcesa efektivigo.

Venis la difinita tago, la 27-an de septembro. Ĉio jam estis aranĝita. Unua esperiga signo estis la alveno de nia kara prezidanto de BEA — k-do Ĥristo Gorov. Kelkajn horojn antaŭ la komenco de la festo alvenis granda grupo da geesperantistoj el Plovdiv, Pazarĝik, Sofio, St. Zagora, Panagjuriŝte k. a. Alvenis liaj gefratoj kaj nevo, reprezentantoj de la hebrea legejo kaj hebrea kultura organizaĵo en Plovdiv, multaj liaj malnovaj kamaradoj, lernantoj kaj amikoj.

Unue, grupeto ĉirkaŭ tridekpersona en marŝkolono vizitis la domon kie loĝis David Sasonov kaj metis florkronon je la memorŝtono. Florkronon metis ankaŭ la organizaĵo de la patrolanda fronto de la kvartalo, Kiam la grupo revenis, la salono jam estis plenigita de ĉirkaŭ 500 personoj.

La prezidanto de la legejo, kiu same portas la nomon de D. Sasonov, per kelkaj vortoj mal-

fermis la kunvenon kaj donis la parolon al k-do Ĥr. Gorov, kiu elokvente kaj tre argumentite raportis pri la vivo kaj agado de David Sasonov kiel homo, esperantisto kaj komunisto. Multaj skeptikuloj, kiuj dubis pri la valoro de Esperanto aŭ aliaj, kiuj malmulton sciis pri ĝi, konvinkigis nun de la raporto de k-do Gorov, ke Esperanto vere helpis en la batalo kontraŭ la faŝismo en nia lando kaj ke ĝi ankaŭ nun kontribuas por la daŭra paco sur la tero.

Post la raporto la legeja ĥoro prezentis mallongan muzikan programon. Ĝi komenciĝis per la himno esperantista — „La Espero“, kiun la ĉeestantoj aŭskultis starantaj kaj je la fino longe aplaudis. Estis ankaŭ kelkaj deklamaĵoj, inter kiuj la poemo „Septembro“ de Geo Milev. Parteto de ĝi estis deklamita en Esperanto en la traduko de D. Sasonov kaj Ĥr. Gorov. En la fino oni prezentis la unuaktan teatraĵeton „La venena pano“. Kiam la ĉeestantoj eliris la salondon, multaj esprimis sian kontenton pro la bone aranĝita solenaĵo.

La solena celebrado de David Sasonov unue atestas pri nia granda estimo al nia patrono kaj krome ĝi helpas al ni baldaŭ malfermi novajn kursojn de Esperanto.

Atanas Gaev

HELPU AL NI!

Mi ĉiam atente legas nian organon „Bulgara Esperantisto“, precipe la rubrikon „Organiza vivo“. Mi tre ĝojas, kiam mi vidas la disvolvon de la esperantista movado en nia lando. Sed, mi vere eksentas honton pro la fakto, ke en nia urbo, malgraŭ distrikta centro la movado malsanas. En la ĉi-jara kongreso en Burgas, nia societo ne estis prezentita eĉ de unu delegito.

La estraro de BEA kaj la esperantistoj el proksimaj urboj devas helpi al ni por plivigligi la esperantistan vivon en Targoviŝte, almenaŭ nun antaŭ la UK en Sofio.

V. Jakov

Targoviŝte, Benkovski 21

LEVSKI

Nia societo kunvenas regule ĉiuvendrede en la klubejo de la loka muzika skolo. Inter la diversaj kulturklerigaj kaj organizaj demandoj en la tagordo, nia ĉiam vigla Esperanto-instruisto — k-do B. Markov ofte legas esperantlingvaj rakontojn, fabelojn k. a. samtempe farante, kun la partopreno de ĉiuj ĉeestantoj, lingvajn ekzercojn kaj gramatikajn analizojn.

La 20-an de septembro al nia societo gastis k-do Ilia Andreev kaj rakontis antaŭ la kunveno pri la sperto de la societo en Kolarovgrad.

Laŭ propono de k-dino K. Uzunova ni planas organizi tri amuzvesperojn en Levski kaj en vilaĝoj Aleksandrovo kaj Drenovo, por tiel propagandi Esperanton kaj malfermi kursojn. La muzikan programon oni preparas sub la gvidado de k-do J. Angelov, violonisto-instruisto.

Angelina Slavova

BURGAS. La 2-an de oktobro nia societo organizis urban kunvenon okaze de la malfermo de la nova lernaro. Anonco pri ĝi aperis en la loka ĵurnalo „Nigramara fronto“. La klubejo estis plenplena de geesperantistoj, gekursanoj-komencantoj kaj multaj geurbanoj. Eĉ ne ĉiuj povis eniri ĝin. En sia parolado k-do B. Golemanov substrekis la gravajn taskojn, starantaj antaŭ la bulgara esperantistaro, nome la preparo por la baldaŭ okazonta oka kongreso de la Partio, kiu prenos historiajn decidojn por la antaŭen marŝo de nia lando kaj popolo dum la venontaj dudek jaroj kaj samtempe la preparo por la 48-a Universala kongreso de Esperanto okazonta venontjare en nia bela ĉefurbo. K-do Golemanov krome priparolis la eblecojn kaj neceson uzi la internacian lingvon en la kulturaj interŝanĝoj, en la komerc, turismo, politiko ktp.

Post la kunveno estis formitaj du kursoj por komencantoj: la unuan, konsistantan el 22 gelnantoj gvidos V. Darakčieva, instruistino kaj la duan el 26 gecivitanoj gvidos J. Stanimirova.

P. Gamiŝev

KUBRAT. Lernojaro por Esperanto-societo „Progreso“ en Kubrat komenciĝis kune kun lerneja jaro de 15. IX. Reveno de la kongresanoj de Burgas kaj la vizito de kelkaj esperantistoj el Germanio, Francio, Pollando en nia urbo estis komenco de agadkampanjo. Ni ankaŭ uzis la lokan radion, afiŝojn kaj reklamojn. Trimembra komisiono vizitis oficejojn kaj enterprenojn kaj persone kontaktiĝis kun geoficistoj kaj laboristoj invitante ilin por esperanto-kursoj. Rezulte ĝis 10. IX. ni havis enskribitajn 63 dezirantojn lerni la lingvon en niaj kursoj. Ekde la 15. IX. en riparita kaj ornamita klubejo alvenis la novaj gekursanoj, distribuitaj en tri grupojn kun apartaj programoj.

Unua grupo kun 25 gecivitanoj laŭ miksita metodo kun kursgvidanto — Hr. Dimitrov.

Dua grupo — 20 gelnantoj laŭ lernolibra metodo kun kursgvidanto — Jivka Georgieva (junulino, farmaciistino).

Tria grupo de 18 gecivitanoj studas en kurso por progresintoj per variaj formoj kaj metodoj kun kursgvidanto — Hr. Dimitrov.

Estraro kaj kursanoj streĉas fortojn por prezenti sin digne al la universala kongreso en Sofio kaj junulara kongreso en Vraca.

Ilija Marinov

prezidanto de junulara grupo

PAZARĜIK. La 15-an de septembro 1962.

Okazis nia unua kunveno dum la nova lernaro. Ni malfermis la kunvenon per raporto pri nia 35-a kongreso en Burgas. Parolis Rosica Goevgieva.

K-do Ivan Vasilev raportis pri 48-a UK en Sofio — 1963. Preparante sin por ĝi ni devas perfektigi en Esperanto per parolanta rondo.

La 4-an de oktobro. Ĉeestis 26 personoj. Oni raportis pri la datreveno de la morto de la esperantisto-batalanto David Sasonov el Ase-novgrad, kaj pri preparo por la junulara kongreso en Vraca, 1963. K-do Ivan Vasilev substrekis, ke multaj eksterlandaj esperantistoj kiel la polaj, leningradaj kaj aliaj multe interresigas pri nia lando, promesinte nepre viziti Bulgarijon dum UK.

La 11-an de oktobro. Ĉeestis 30 geesperantistoj. Oni malfermis kurson por komencantoj kun lektoro Nikola Ĉarcarov. K-do K. Konstantinov malfermis alian kurson en III gimnazio kun 30 gelnantoj, intencante viziti 19-an junularan Esperanto-kongreson, partoprenonte ĝian belartan programon. K-to Petko Arnau-dov gvidas gelnantan rondeton de Esperanto kun 20 personoj en II gimnazio. K-do Najden Angelov estas kursgvidanto de Esperanto en II progimnazio kun 26 progimnazianoj.

Ĉiu ĵaŭdo vespere funkcias la urba kurso por komencantoj. Ekfunkciis ankaŭ progresinta kaj supera kurso komence per demandoj kaj respondoj. La kursoj okazas en nia bela klubejo, str. Gen. Gurko 18, Pazarĝik.

La 14-an de oktobro. Dimanĉe antaŭ tag-



meze en la sama klubejo ni renkontis kun granda ĝojo kaj plezuro nian atendatan karen-gaston — s-ron Pompilio (la konstanta kongresa sekretario de UEA, Nederlando) kun k-do D. Dojčev, estraro de BEA. K-do P. Arnaudov kaj Iv. Vasilev prezentis lin per konciza parolado klariginte la celon de lia veturo tra Bulgario. S-ro Pompilio esprimis sian admiron de nia ĉarma lando kaj de nia forta esperantista movado. Li diris: „Mi estas certa, ke la 48-a UK de Esperanto en Sofio venontjare estos la plej sukcesa kaj brila kongreso ĝis nun. Ĝi estos sufiĉe alloga kaj amikeca. Mi deziras venontjare denove viziti Pazarĝikon, esperante ke la plimulto de esperantistoj en via urbo estos ĝeĝunuloj!“

Adiaŭinte lin, ni promesis amasan aliĝon al 48-a UK en Sofio kaj seriozan laboron por perfektigo en la internacia lingvo, por ke ni inde prezentu nin al la eksterlandaj ĝeesperantistoj.

Rosica Georgieva

RUSE. Centoj da junuloj, malnovaj kaj novaj esperantistoj kaj partoprenantoj en la novaj kursoj de Esperanto ĉeestis la solenan vesperon, kiu estis organizita la 20. X. en la salono de la Komsomolo okaze de la malfermo de la nova lernejo. La kunveno estis malfermita de la studento Momĉo Momĉev — membro de la estraro de Bulgara Esperanto-Junularo. Pri la signifo kaj utilo de la internacia lingvo parolis k-dino M. Preslavska. Ŝia prelego estis subite interrompita per pioniraj fanfaroj. Grupo de pioniroj el la armena lernejo „Mesrobjan“ arde salutis la ĉeestantojn je la nomo de ĉiuj pioniroj en Ruse. Salutis la kunvenon same k-do G. Ivanov je la nomo de la Distrikta Komitato de la Partio kaj k-do S. Kadišev de la Distrikta Komitato de la Patrolanda Fronto.

Oni prezentis riĉan programon en Esperanto kaj bulgara lingvo kun la partopreno ankaŭ de la plej juna esperantisto en la urbo — kvadrara Enĉo Kirilov.

La solenaĵo finiĝis per junulara amuziĝo kaj dancoj.

La malnovaj kaj la estontaj esperantistoj — hodiaŭaj kursanoj — fervore lernas la lingvon kaj preparas sin amase partopreni en la 19-a internacia junulara Esperanto-kongreso en Vraca kaj la 48-a universala kongreso en Sofio en 1963.

Jordan Kalinov

Stanke Dimitrov. La esperantista societo „Marek“ ricevis telegramon de BEA, ke la 12-an de oktobro 1962, revenante de Rila monaĥejo en nia urbo venos la KKS s-ro Glauco Pompilio. Tiu sciigo multe ĝojigis ĉiujn ĝeesperantistojn en la urbo.

Venis la antaŭfiksita tago. La lastaj preparoj por renkontiĝo de la kara gasto estas faritaj. Kaj jen, je la 16.30 horo ni fine povas bonvenigi la gastojn: s-ro Glauco Pompilio, juna kaj tre simpatia italo, kaj lia kunvojaĝant-

to D. Dojčev, membro de la Estraro de CK-dej BEA. Niaj gastoj, akompanataj de la prezidanto de la esperanto-societo konatiĝis kun la urbo kaj estis informitaj pri ĉiuj pli gravaj vidindaĵoj. Je la 18.30 horo multe da esperantistoj okupas ĉiujn seĝojn en la esperantista klubejo. Venis ankaŭ neesperantistoj kaj multaj devis resti ekstere sur la strato.

En belega zamenhofstila esperanto-parolado s-ro Pompilio rakontis al la kunvenintoj la signifon de la internacia lingvo kaj de la universalaj kongresoj. La ĉeestantaro atente aŭskultis lian enhavoriĉan paroladon kaj englutis ĉiun lian vorton. Ili kunvinkigis, ke Esperanto estas parolata kaj aplikata en la viva parolo, ke UK estas vizitinda. Kun bedaŭro ili disigiĝis kun nia simpatia gasto, sed entuziasmigataj ili deklaris en si mem, ke ili laboros per ĉiuj fortoj por la prospero de la internacia lingvo.

Post la kunveno s-ro Pompilio, akompanata de grupo da entuziasmigataj esperantistoj, vespermanĝis en agrabla esperanta medio.

La postan tagon oni vizitis kamaradinon Voleva — estro de fako „Klerigo kaj kulturo“ en nia urbo. En mallonga interparolo s-ro Pompilio interesiĝis pri kelkaj demandoj pri kiuj ŝi donis klarigojn. Ŝi substrekis, ke nia socio, la aŭtoritatuloj en nia urbo havas pozitivan rilaton al la internacia lingvo kaj ŝi promesis ĉiam subteni la agadon de la esperantistoj kaj de ilia loka societo.

Boris Drenski

APEROS NEELDONITA VERKO DE D-RO L. L. ZAMENHOF

La 4-a volumo de la zamenhofa traduko de la „Fabeloj“ de H. C. Andersen, kiu, pro militaj kaŭzoj, restis ĝis nun neeldonita, aperos en februaro 1963.

La libro enhavos 24 fabelojn de la fama dana verkisto. Ĝi ampleksos supozeble 224 paĝojn kaj estos ilustrita per 50 artaj desegnaĵoj (el kiuj 10 tutaĵaj kaj 20 duonpaĝaj) speciale faritaj por la Esperanto-eldono de unu el la plej elstaraj polaj nuntempaj artistoj, A. Uniechowski.

La „Fabeloj“ de Andersen estas eldonataj de „Heroldo de Esperanto“.

La lernantoj en la agrikultura lernejo en Peŝtera, membroj de la unua rondo por lernado de Esperanto, antaŭ nelonge fondis junularan grupon ĉe la loka E.-societo en la urbo. La fondkunveno partoprenis 15 gelnantoj. Oni interŝanĝis opiniojn pri la estonta perfektigo en la lingvo, pri la celoj de la internacia korespondado kiel ilo de la internacia junulara amikeco kaj solidareco ktp. Oni elektis estraron de la grupo konsistantan el prezidanto: Kipra Zaneva, sekretario-kasisto: G. Stojanov kaj membro Anastasija Zojnova. La adreso de la nova grupo estas: Junulara Esperanto-grupo „Abundo“, Peŝtera, Agrikultura lernejo pri tabako.

EKSPOZICIO EN VRACA

La junulara grupo „Ĥristo Botev“ ĉe Esperanto-societo „Sukceso“ en Vraca organizis de la 1-a ĝis la 10-a de oktobro grandan esperantan ekspozicion. En la granda salono de la Teksa teknikumo estis ekspoziciitaj pli ol 100 volumoj da esperanta literaturo, multaj fotoj kaj leteroj, respegulantaj la vivon de la junulara grupo dum la lastaj jaroj.

La ekspozicion vizitis multaj lernantoj, civitanoj kaj ankaŭ la KKS — s-ro Glauco Pompilio, vizitinta nian urbon konekse kun la organizo de la 19-a kongreso de TEJO en Vraca. S-ro Pompilio esprimis sian kontenton pri la aktiveco de la vracanaj esperantistoj kaj sian konvinkigon ke ili inde organizos la internacian junularan kongreson.

Enjo Daskalov



Vigla diskutado antaŭ la kongreso
en Ystad

De la 11-a ĝis la 18-a de aŭgusto en la malgranda skania havenurbo kaj ripozloko Ystad okazis la 18-a Kongreso de la esperantista junularo. Pli ol 70 partoprenantoj reprezentis 16 landojn. Partoprenis ankaŭ tri bulgaroj.

La kongresanoj loĝis en apudmara strand-hotelo kaj en la sama aŭ en apudaj konstruaĵoj okazis ĉiuj kongresaj aranĝoj.

Dum la malferma ceremonio la kongreson salutis la urbestro (en Esperanto!) kaj reprezentantoj de ĉiuj landoj. La sama vespero okazis la kongresa balo, dum kiu la kongresanoj (sen ge-) havis interalie la malfacilan taskon elekti la plej ĉarman esperantistinon de la jaro. La titolon „Miss Esperanto 1962“ ricevis la svedino Marianne Bergman.

En kelkaj diskutaj grupoj oni interŝanĝis opiniojn pri la temoj: „Esperanto kaj la evolulando“, „Neŭtraleco kaj alianco“ kaj aliaj. Unutagaj gastoj de la kongresanoj estis Prof. H. Yagi — la nova prezidanto de UEA, kiu prelegis pri „La junularo kaj la Unesko-movado“ kaj Prof. Ivo Lapenna, kiu preparolis la temon „Kiel oni igu Esperanton alloga“. Okazis ankaŭ la kutima oratora konkurso, kiun gajnis nia jugoslavia amiko Svobodan Zlatnar, dume la duan premion oni prijuĝis al Hannelore Lukesch el Munkeno.

Oni provis organizi renkontiĝon kun la loka junularo, sed al ĝi venis . . . unu junulo, cetere tre vigla kaj diskutema.

Ĉiuvespere la kongresanoj dancis, kantis aŭ rigardis bone elektitajn svedajn filmojn.

Dum la kongreso, dum pluraj horoj la Komitato de TEJO vigle diskutis diversajn problemojn kaj prenis gravajn decidojn por la estonteco de la organizo. Interalie oni decidis iniciati larĝan kampanjon antaŭ diversaj neesperantistaj organizaĵoj, starigi junularan revuon kaj oni akceptis la unuan perspektivan planon de TEJO. Estis elektita la nova estraro nome: G. Becker (Okc. Germanio), kiel prezidanto; C. Minnaja (Italio) kaj S. Simeonov (Bulgario) — vicprezidantoj; M. Pietrzak (Pollando) — ĝenerala sekretario; H. Tonkin (Britio) — kasisto, Ivo Osibov (Jugoslavio) — redaktoro kaj Sv. Zlatnar (Jugoslavio), kiel estrarano pri kulturaj aferoj.

Dum la ferma kunveno, ni oficiale invitis ĉiujn viziti nian ĉarman landon kaj partopreni la 19-an kongreson de TEJO en Bulgario. Efektive kelkajn horojn pli poste la plimulto el la kongresanoj disigis per la vortoj: „Ĝis revido venontjare en Vraca“.

Emil Keremidĉiev

En ĵurnalo „**Dunavska pravda**“ — Ruse (de 12. IX. 1962) — longa informo de J. Kalinov sub titolo „Esperanta arta programo en vilaĝo Štrákľevo“ — pri la renkontiĝo de la vilaĝaj junuloj kun kvar junuloj-esperantistoj — pabatalantoj el urbo Grajšhajm, GFR.

En ĵurnalo „**Narodno delo**“ — Varna (de 18. IX. 1962) — sciigo en la kroniko pri la kunveno je la 18-a de septembro, je kiu parolos s-ro Knol je temo „GDR laŭ la vojo al la socialismo“, akompanata kun projekcio de diafilmoj.

En la sama ĵurnalo (de 18. X. 1962) — sciigo en la kroniko, ke en la kunveno je 18-a de oktobro parolos s-ro G. G. Pompilio — Konstanta Kongresa Sekretario pri la 48-a Universala Esperanto-kongreso en Sofio en aŭgusto 1963.

En ĵurnalo „**Dimitrovgradska pravda**“ — Dimitrovgrad (de 27. IX. 1962) — anonco, ke je la 9-a de oktobro oni malfermas Esperanto-kursojn.

En ĵurnalo „**Oteĉestven zov**“ — Vraca (de 6. X. 1962) — aperis intervjuo kun s-ro G. G.

Pompilio titolita „La Universala Kongreso de la junaj esperantistoj en Vraca — kongreso de la adeptoj de la paco“.


En ĵurnalo „**Haskovska tribuna**“ — Haskovo (de 11. X. 1962) — aperis informo pri la bona ekspozicio, kiun aranĝis la esperantista societo.

En la sama ĵurnalo (de 18. X. 1962) — artikolo de G. Idakiev titolita „Esperanto-movado en Haskovo“.

En ĵurnalo „**Stopanoved**“ — Varna (de 19. X. 1962) — artikolo kun titolo „Studentoj, lernu la internacian lingvon Esperanto“, en kiu interalie oni informas, ke je la 17-a de oktobro estis malfermita la unua kurso por gestudentoj.

En ĵurnalo „**Veĉerni novini**“ — Sofio (de 30. X. 1962) — anonco, ke la Esperanto-societo „Aŭtotransporto“ kaj la Memvola organizaĵo por kunhelpo de la defendo de la patrolando-regiono „D. Blagoev“ malfermas 6 monatajn kursojn por komencantoj kaj progresintoj je 2-a de novembro.

Ne forgesu la templimon por abonado al „Bulgara Esperantisto“ -la 20-an de decembro!



La gekongresanoj de la 18-a kongreso de TEJO

PLIVIGLIĜO ĈIRKAŬ LA MONTODOMO „ESPERANTO“

Dank' al la sindona laboro kaj speciale pro la monokolektado de la esperantistoj la konstruado de la montodomo progresas. Jam estas utiligebla unu ĉambro, kie oni povas labori kaj dormi dum la vintro. La donacita svisa kuireja forno de Saša Keremidĉieva el Sofio hejtigas la ĉambrojn.

La estraro de la turista sekcio „Esperanto“ aprobis la unuan liston de la fondintoj de la montodomo:

Esperanto-societo „M. Gorkij“,	Sofio
Esperanto-societo „Lumo“,	Târnovo
N. Nikolov	Sofio
L. Mladenov	„
G. Petrov	„
M. Benvenisti	„
V. Oljanov	„
A. Lakov	„
S. Keremidĉieva	„
I. Vasilev	Pazarĝik
S. Vasilev	„
J. Thomas	Parizo

E. s-eto „M. Gorkij“, Sofio, donacis fornon por hejtado de la salono. La konstanta kongresa sekretario G. Pomplio promesis aĉeti petrolan purplampon. Ĝi estas necesega pro la fakto, ke nun ni ne havas eblecon alkonduki la elektran kurenton, kiu estas for de la montodomo je 700 metroj. Fratoj Vasilev jam transdonis la faritan de ili marmoran tabulon.

Novaj kontribuantoj:

Esperanto-societo „Lumo“	Tarnovo	60 lv.
T. Oŝanski	Sofio	25 „
159 organizaĵo de BKP	„	20 „
V. Oljanov	„	8 „ (entute 23)
M. Benvenisti	„	5 „
V. Nikolova	„	5 „
D. Dojĉev	„	4 „
I. Mirkova	„	2 „
M. Ivanov	v. Ĵeleznica	1.10

Por finpretigo de la domo estas necesaj ankoraŭ 1,500 levoj. Helpu por pli rapida kolekto de la monrimedo! Farigu fondinto de la montodomo!

* * *

La 30-an de septembro k. j. ĉe la montodomo „Esperanto“ okazis la unua oficiala renkontiĝo de la turistoj-esperantistoj. Kvankam la vetero ne estis bona venis 48 personoj. Inter ni estis ankaŭ nia svisa amiko Walter Sonderger. Ĉiuj fervore laboris. Tagmeze estis organizita komuna manĝado. E-tis disdonita senpage varma manĝaĵo. Bonvenigis la alvenintojn la prezidanto de la turista esperanto-sekcio — Nik. Nikolov. Estis decidite, ke ĉu jare en la mezo de septembro oni okazigu similajn renkontiĝojn. Pro malbonigo de la vetero ne okazis la literatura programo kaj la konkurso kun premioj.

**La estraro
de la Turista Sekcio „Esperanto“**



En Moskvo estis organizita metodika kunveno por prijuĝi esperantajn lernolibrojn. Speciala prezidantaro de la kunveno el erudiciaj k-doĵ, kiel kandidato de medicino E. Salnikov, laŭreato de la ŝtatpremio d-ro F. Korovin, A. Zisman, lingvisto E. Polsemen (Sverdlovsk), sciencisto A. Kulichenko (Saratov) instruisto V. Kolobarov (Jegorjevsk) kaj aliaj — prijuĝis ĉirkaŭ 20 esperantajn lernolibrojn. Bonan kaj utilan kritikon de nove aperinta lernolibro „Elementoj de Esperanto“ de I. V. Sergeev faris N. Rytjkov. Li laŭdis la krestomatian kaj vortaran partojn de la libro, kaj akre kritikis la gramatikan parton. Konstatinte la mankon kaj la erarojn, li konkludis, ke I. Sergeev estas ja verkisto, sed ne gramatikisto, pro kio okazis konfuzo. La parolinto ankaŭ voĉlegis leteron de la direktoro de CED, kiu esprimis timon, ke per la libreto de Sergeev oni lernos Esperanton erare.

Pri la simpleco de sia esperanta lernolibro, kunmetita en kelkaj okulvideblaj tabeloj, raportis E. Polsemen.

Pri apartaĵoj de esperantaj lecionoj (24) de instruisto J. Flerovskij rakontis T. Kulagin.

Pri la facila kaj interesa lernolibro de Esperanto en 36 lecionoj kun vortaro por junularo de instruistino V. N. Seryševa raportis d-ro F. Korovin.

Pri originaleco de sia mnemonika vortareto rakontis la aŭtoro A. Zisman.

D-ro L. Kubasov sciigis la ĉeestantojn pri la eldono de la esperanta lernolibro de A. Kerner en Blagoveščensk en 25,000 ekz.

Pavlov el Leningrado komunikis pri granda sukceso de propaganda broŝuro kun mallonga esperanta gramatiko kaj vortaroj de N. Andreev, presita en 1957-a en 95,000 ekz., nun tute elĉerpita. Ankaŭ la esperanta lernolibro de Semenova kaj Teterin, kiu nun estas reviziata, baldaŭ denove aperos.

Ankaŭ estis prijuĝitaj kelkaj aliaj lernolibroj: ekz. Ergolskij — Esperanto kaj Ruĝa Kruco, Edm. Privat — Esperanto en 50 lecionoj, Lernolibroj de Rublev, Svistunov, Voleviĉ, Vasilchenko kaj aliaj. En diskuto partoprenis pli ol 50 gesamideanoj.

En aprilo Tutsovietia Esperantista Ĵurnalistika Sekcio aranĝis renkonton kun gesamideanoj el Moskvo en la sekcio. N. Danovskij faris prelegon pri Tutmonda Esperantista Ĵurnalistika Asocio (TEJA), kiu estis fondita dum la 18-a UK en Edinburg (Anglio), kie sveda ĵurnalistoj — Ejnar Adamson el Göteborg — iniciatis la kreon de TEJA. Samtempe en 1926-a dum la kongreso de SAT en Leningrado estis fondita Tutsovietia Esperantista Ĵurnalistika Asocio. K-do Danovskij rakontis pri la historia disvolvigo kaj granda laboro de tiu asocio kaj pri ĝia nuna stato ankaŭ, pri nuntempa tasko — krei konvinkajn literaturajn verkojn por konigi pri Esperanto en naciaj lingvoj, kiel same utiligi artikolojn el esperantaj gazetoj por la nacia gazetaro. Nun oni kalkulas ĉirkaŭ 30 ĵurnalistojn-esperantistojn en Moskvo kaj pli ol 100 ĵurnalistojn en USSR. Tio estas granda forto por antaŭenpuŝi la esperantan agadon en nia lando.

La raporton vigle pridiskutis poeto K. Gusev, ing. Zajdman kaj la aktoro N. Rytjkov.

La 20-an de aprilo estis organizita vespero, dediĉita al la memoro de V. I. Lenin okaze de la 92-a datreveno de lia naskiĝtago. D-ro E. Salnikov, malfermante la vesperon, komunikis, ke la aktoro N. Rytjkov estas aprobita de ŝtata komisiono en la rolo de V. I. Lenin. Nia samideano nun prezentas ĉi honoran rolon en literaturaj koncertoj de Filharmonio.

Prof. S. Ĉahotin rakontis pri la historio de Esperanto, substrekkante la superecon de Esperanto kompare kun aliaj provoj krei internacian lingvon. Esperanto venkis, dank' al tio, ke ĝi estis pli facila kaj vivpova belsona, logika kaj komprenebla ilo por ĉiuj homoj, ne nur en Okcidento, sed ankaŭ en Oriento. Estis komunikite, ke oni intencas organizi en Kembriĝo (Anglio) Internacian Kongreson de Mikrobiologoj, dediĉitan al la 50-jara jubileo de operacia malfermo de biologia ĉelo, kie oni intencas diskuti la problemon en Esperanto.

Teodoro Kulagin
Moskvo, USSR

Brave, lumanoj!

La estraro de Esperanto-Societo „Limo“ en Târnovo helpis la konstruadon de la montodomo, sendante 60 levojn. Ni ĝarulas la estraron pri la imitinda iniciato. Kiuj skvos?



HONORE AL BULGARIO

Okaze de la 18-jara datreveno de la liberigo de Bulgario, ni — moskvaj esperantistoj — kolektiĝis hodiaŭ la 9-an de Septembro en haŭso de Centra Kulturdomo de Medicinistoj por solena kunveno. Ĉeestis gegastoj: k-do Otto Bässler kun la edzino kaj fratino (GDR), f-ino Irene Tunstall, s-ro W. D. Chaplin kaj s-ro Iates, gedirektoroj de Angla firmao „Lancastria International Ltd.“, kaj la konstanta vizitanto de nia klubo — granda amiko de Esperanto la vietnama ambasadoro k-do Nguyen Van Kinh.

Prelegis la bulgara instruisto Veselin Georgiev, kiu edziĝinte al membrino de la moskva junulara esperanto-grupo „Fajrero“, de nun loĝas en Moskvo.

Aŭskultinte la elokventan kaj riĉenhavan raporton de k-do Georgiev, kaj salutvortojn de le gegastoj la kunveno tutanime gratulas la fratan bulgaran popolon kaj al ĉiuj esprimas elkorajn bondezirojn.

Vivu sovet-bulgara amikeco per la internacia lingvo Esperanto!

De la moskvaj esperantistoj

ESPERANTO-AGADO EN JALTA

Jalta estas mondfama, sovetlanda banloko (klimata kuracloko) sur suda bordo de duoninsulo Krimeo en Nigra maro.

Ĉiujare miliono da sovetlandanoj sin kuracas ĉi tie.

Dek miloj da sovetlandaj kaj eksterlandaj turistoj ĉiumonate vizitadas Jaltan.

Memkompreneble, ke disvolvo de la internacia helplingvo Esperanto en nia urbo havus grandan kaj gravan signifon. Tamen ni devas pruvi al urba estraro valoron de la lingvo ne prelegante, sed praktike.

Multcentoj da leteroj alŝvebitaj el eksterlando Jaltan nenion pruvas. Bezonas, ke ĉiu eksterlanda esperantisto ĉie demandu (en hoteloj, restoracioj, dum oficialaj renkontoj ktp.) ĉu en la vizitata loĝloko ekzistas esperantistoj.

Multaj riproĉas min: „Kial vi propagandas lingvon Esperanto? Ja la lingvon sciis nur 7 personoj el 60,000 eksterlandaj vizitintoj Jaltan.“ Kion mi povas kontraŭdiri?

Tamen en Jalta ekzistas de 1953 Esperanto-sekcio (klubeto) fondita ĉe urba biblioteko.

Nun la Esperanto-klubo havas pli ol 30 organizitajn membrojn. Mi ĉiumonate faras po 1 prelegon pri Esperanto (plej parte por gekurortanoj), kaj ĉi jare laŭ konsilo de la estraro aranĝas 8-tagajn studgrupetojn de elementa Esperanto-kurso.

Ĉi letere mi aldonas fotokarton kaj kopion de dankletero de la grupo, ĝi multon klarigas.

En multaj partoj de Jalta estas videblaj niaj afiŝoj kaj diversaj propagandplakatoj.

Dum pasintaj 4 jaroj pli ol cent eksterurbanoj ellernis en Jalta elementan studkurson, multaj el ili reveninte hejmen fariĝis aktivaj esperantistoj.

Jaltanaro interkorespondas kun geesperantistoj el 35 landoj kaj multaj enlandaj geesperantistoj.

Ni esperas, ke esperantistaro de la tuta mondo helpas al ni plibonigi nian agadon. Ni bezonas: diverslingvajn propagandilojn de Esperanto, turismajn prospektajn esperantlingvajn, kaj ke nin trovu eksterlandaj geesperantistoj aŭ iliaj gekonatuloj, vizitante Jaltan.

Ni ĉi jare renkontis 7 eksterlandajn geesperantistojn, sed sendube Jaltan vizitadas pli multe da geesperantistoj.

Memkompreneble, niaj gastoj sukcesas pli bone honatiĝi kun ĉarma Jalta kaj ĝia ĉirkaŭaĵo per nia helpo.

Mikaelo Cimberov
Jalta, Krim, USSR



DEZIRAS KORESPONDI

ĈEĤOSLOVAKIO

Du 25-jaraj s-anoj (asistanto de altlernejo kaj teknik-oficisto) serĉas du samaĝulojn, prefere el Sofio, por amika korespondado kaj reciproka interŝanĝo de vizitoj en 1963. Adreso: Rostislav Richter, VŠZ, agrochemie, Zemědělská 1, Brno.

Bartulec Paŭlo, Stonava 100, Silezio — per PK.

POLLANDO

Piotr Mochal, ul. Krakowska 3/2, Bystrzyca Kłodzka (woj. Wrocław) — kun bulgaroj; PM, alumentetiketoj, PI.

F-ino Zofio Nicht, str. Novoviejska n-ro 11, Legnica 3 — kun ĉiuj landoj.

Władysław Poszywak, str. Dworcowa 41/7, Bydgoszcz, 17-jara knabo.

Janusz Ziolkowski, str. Al. 1-go Maja 60/Z, Bydgoszcz, 17-jara knabo.

Tri lernantinoj el mezlernejo deziras korespondi kun la tuta mondo. Skribu al: Maria Kotlinska, Bralnica, ul. Nostowa 3, Pomorze; Teresa Vaclarzewska, Bralnica, ul. Kamionka 18, Pomorze; Krikel Agnieszka, Bralnica, ul. Zazienna 15, Pomorze.

HUNGARIO

Geedzoj Agnesa kaj Teodoro Czako, Szazhalombatta, Poŝtako 9 — kun ĉi pri ĉi, interŝanĝas alumentetiketojn, fotojn, aktorfotojn, gramofondiskojn, PK.

USSR

Sergej Makurin, str. Sovetskaja 126, Ŝadrinsk 4, Kurganskoj obl. — kun ĉi pri sporto, turismo kaj aliaj temoj, interŝanĝas PI.

FINNLANDO

S-rino Helena Rukonen (instruistino, 57-jara) Karuna — kun bulgarinoj, precipe el Sofio, pri geografio kaj aliaj temoj, krom sciencaj.

VIETNAMIO

Nguyễn-van Nhi, Dõi 5. Nông-tru'ông Lam Son, Ngoc-Lac, Chanh-Hòa

BULGARIO

Ivan Grigorenko, ul. Vapcarov 11, Kubrat, okr. Razgradski — oficisto, 32-jaraĝa, kun ĉi pri ĉi.

GERMANIO

Herm. Liebelt, Magdel-str. 91, Jena, GDR.

LOVEĈ Dum 1962 societo „Espero“ havis entute 104 abonojn, el kiuj 38 al „Bulgara Esperantisto“, 25 — „El Popola Ĉinio“, 15 — „Nuntempa Bulgario“ ktp. Bone agis k-doĵ Kiril Kalčev, kiu mem varbis 86 abonojn, Marko Bliznakov k. a. La societo promesas honore al la 48-a UK en Sofio duobligi la abonantojn al „Bulgara Esperantisto“ por 1963.

Noto de BE. La redakcio de BE gratulas la bravajn samcelanojn el Loveĉ kaj alvokas la aliajn societojn postsekvi ilian ekzemplon.

NOVA ESPERANTISTA GEEDZA PARO

La 16-an de septembro en Katovice okazis la geedziĝo de f-ino Inez Banaš kun nia amiko Ljubomir Marinov el Ruse — prezidanto de la fervojista societo en Ruse. Al la nova internacia paro niajn plej sincerajn gratulojn kaj bondezirojn.

La Estraro de
Bulgara Esperanto Junularo

Ĉefredaktoro: Violin OLJANOV

Redakta komitato: Kiril DRAJĖV, Atanas LAKOV, Canko MURGIN (vicĉefredaktoro)
Ivan SARAFOV, Simeon SIMEONOV.

Korektis: Vasilka Petrova

Adreso de la redakcio: Sofio, poŝtkesto 66. Tel. 3-26-82

Не пропускайте срока за абониране за съюзното списание

„Bulgara Esperantisto“

до 20 декември

Абонирането става само в местната поща. Канцеларията на съюза тази година няма да приема абонаменти. Ръководствата на дружествата трябва да станат настоятели на РЕП и с техни (или свои) кочани да събират абонати.

Нито един есперантист да не остане без „Bulgara Esperantisto“!

Не чакайте последния срок!

Конгресните такси за 48-и световен есперантски конгрес в София изпращайте с пощенски запис до Българска народна банка, Софийски градски клон, по сметка № 105ч/2993

Por la jaro 1963

pere de Bulgara Esperantista Asocio, p. k. 66, Sofia, vi povas aboni al:

„HEROLDO DE ESPERANTO“ — 4.68 lv.

„EL POPOLA ĈINIO“ — 1.00 lv.

„VIETNAMIO ANTAŬENMARŜAS“ — 1.00 lv.

Por membriĝo al Universala Esperanto-Asocio oni pagas:

MEMBRO KUN JARLIBRO (MJ) — 2.44 lv.

MEMBRO-ABONANTO (MA) — 4.88 lv.

(Membro kun jarlibro kaj revuo „Esperanto“.

La sumojn sendu al p. k. 66, Sofia).